RADIO HABANA CUBA
Artículo Editado por Maritza Gutiérrez González
20/03/2018 23:04:33

Alvoko de UN por toleremo kaj respekto al diverseco.

UN, 20 mar (RHK) La ĝenerala sekretario de UN, Antonio Guterres, alvokis impulsi la toleremon, inkluzivigon kaj respekton al diverseco per debato kaj malfermo de la socioj.

Ni devas kunlabori por elimini mesaĝojn de malamo, kaj tiun falsan sintenon ke eblas rifuzi kelkajn kaj inkluzivigi aliajn, li asertis okaze de la asembleo de UN.

Ni ne devas permesi ke la ekstremistaj ideologioj kaj novnaziaj, normaliĝu kaj legitimiĝu, emfazis la diplomato, kiu elstarigis ke diskriminacio persistas en multaj landoj kaj komunumoj tra la mondo, kiel la trista ekzemplo de la rohinjoj, minoritato islama persekutata de la aŭtoritatuloj de Miamaro.

Li memorigis la gvidantecon de la sudafrikano Nelson Mandela, kiu batalis la tutan vivon por kontraŭstari maltoleremon, rasismon kaj diskriminacion.

Tiun ĉi 21-an de marto estas la Internacia Tago de elimino de rasa diskriminacio, establita de UN en 1966, precize en la dato kiam okazis la murdo de Shaspeville mane de la sudafrika polico kontraŭ la protestantoj pro aplikado de Apartiĝo.